# ESPERANTO ★ TRIUMFONTA ★

**Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj. Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).**

**Protektantoj:**
*Dr. Leono Zamenhof*, Warszawa
*W. M. Page*, adv., Edinburgh
*Ernest Archdeacon*, Paris
*J. Gili Norta*, komercisto, Barcelona
*H. Fischer*, grandindustriisto, Bucureŝti
*Frans Schoofs*, Antwerpen
*P. v. Medem*, bank- kaj fabrik-direktoro, Kaunas.

**N-o 153**
**19. 8. 1923**

**Redakcio:**
Ĉefredaktoro: *Teo Jung.*
Redaktoro: *Robert Kreuz.*
Redakciaj kunlaborantoj: *Zanoni* (literaturo) *M. Butin*, L. K.

**Administracio:**
(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

**Tarifon**
vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

**Antwerpen, Barcelona, Bucureŝti, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**


## Ferma kunsido de la XV-a.

**(Merkredo, 8. aŭgusto.)**

La Prezidanto D-ro Dietterle malfermas la kunsidon precize je la 9. h.

D-ro Ledermann legas salut-telegramojn kaj -leterojn, i. a. de Turkestanaj Esperantistoj, de Prof. Cart, s-oj Poncet kaj Kenn. — Komunikas, ke por la bankedo anoncis sin 1600 personoj, sed partoprenis nur 6—700.

La Prez. legas raportojn pri fakaj kunsidoj de vegetaranoj, poŝtistoj, instruistoj, pacifistoj kaj laboristoj, speciale atentigante pri la Esp. movado inter laboristoj. — Malfermas diskuton pri la venonta kongresurbo.

S-o Schade klarigas la inviton de Wien, kiu venas de Esp. Delegitaro Wien, de Tutaŭstria Esp. Delegitaro, de l' urbestro kaj de la registaro. Komunikas, ke la katolikoj kaj la policistoj jam elektis Wien kiel sian venontan kongresurbon.

S-o v. Frenckell, parolante pri Sofia, sciigas, ke la bulgara ĝen. konsulo, s-o Kaufmann promesis sumon de 100 000 levoj por prepari kongreson en Sofia. Tamen rekomendas provizore rezigni je Sofia kaj apogi Wien.

S-o Warden diras, ke la Unuiĝo de Int. Asocioj invitas la XVI-an al Belgujo kaj ke la belga federacio konsentas.

~~S-oj Atanasof kaj Kolev parolas por Sofia,~~ iu s-ino el Kroatio por Wien, ĉar „balkano estas vulkano“.

S-o Stettler atentigas pri la fakto, ke tiel gravaj urboj deziras havi Esp. kongreson. Diras, ke ĉiujara kongreso eble ne estas necesa, ke ĝenerala kongreso kaj laborkongreso estas du diversaj aferoj.

Demandite de la Prez., la kunsido esprimas la deziron ke Univ. kongreso okazu kiel ĝis nun ĉiujare.

S-o Fischer-Bukareŝti proponas okazigi en Bruxelles teknikan konferencon kaj en Wien Univ. Kongreson, se ne la bulgara registaro oficiale invitos al Sofia.

Ĉeestanta aŭstra Konsulo diras, ke li estas oficiale sendita de la registaro por observi la Kongreson.

S-o Major nome de Hungara Lab. Societo apogas Wien, pro la valuto.

Norvega s-ano parolas por Bruxelles, ĉar 1. ni ne kunvenu dufoje laŭvice en germana urbo nek dufoje laŭvice tiel proksime; 2. la germanoj, kiuj ĉefe subtenas Wien, estas la plimulto de l' kongreso; 3. ni restu absolute neŭtralaj.

D-ro Privat rimarkigas, ke invitantoj ne pensu nur pri si, sed pri la tuta movado. Atentigas pri la stranga fakto, ke jam kelkfoje oni invitis por postvenanta jaro (ekz. Wien en Helsinki, kaj nun Milano). Diras, ke la Kongreso esprimu sian liberan opinion, C. K. decidos.

Sofianino klarigas, koncerne loĝejojn, ke en domoj de riĉuloj en Sofia oni ofte ricevas senpagajn loĝejojn.

S-o Czek diras, ke en Oriento ankoraŭ ne okazis Univ. Kongreso.

S-o Grenkamp apogas Sofia.

Kav. Vaona esprimas sian ĝojon pri la deziro de la s-anoj aranĝi kongreson en Italujo sed la italoj devas rezigni en la venonta jaro.

S-o Grot subtenas Sofia.

F-ino Nickel Wien, la jaman altkastelon de Esperantujo.

La Prez. voĉdonigas pri finigo de la diskuto post parolo de la l anoncinto.

S-o Dresen proponas, ke la XV-a rezignu dezirespimi kaj lasu ĉion al C. K.

D-ro Ledermann petas zorgi, ke ne ripetiĝu, ke en kongreso ne povas partopreni iuj popoloj.

D-ro Privat respondas, ke la C. K. postulos garantiojn de la koncerna registaro, ke ĉiuj popoloj povos partopreni.

S-o Schade petas tujan decidon por ne perdi tempo por preparo de l' Kongreso.

S-o Dorĉev apogas Sofia.

S-o Pitlik subtenas la proponon de s-o Dresen.

La Prez. diras, ke pro neŭtraleco li persone preferas Bruxelles.

S-o Blicher petas tuj decidi por ne perdi tempon.

S-o v. Frenkell konstatante kaj konkludante, per lerta parolado nun subtenas Sofia, sed petas la bulgarajn s-anojn rezigni, se ne la bulgara registaro oficiale invitas plej malfrue post unu monato. La Wien'anoj eventuale aranĝu antaŭkongreson.

La Prez. kritikas, ke multaj s-anoj aplaŭdis ĉiun parolanton, ĉu por, ĉu kontraŭ. — Voĉdonigas pri propono Dresen (rifuzita), Bruxelles (malmultaj voĉoj), Sofia (248 voĉoj), Wien (215 voĉoj), Milano (malmultaj voĉoj).

Iu s-anino diras, ke estas necese, ke invitantoj havu oficialajn dokumentojn, kiel ekz. Wien.

S-o v. Frenckell esprimas sian ĝojon pri voĉdono por Sofia; sed ĉar Wien prezentis oficialajn dokumentojn, li nun denove apogas Wien.

D-ro Privat dankas al la konsulo de Aŭstrio pro lia afabla ĉeesto kaj invito, dankas ankaŭ ~~al la bulgaraj samideanoj. Promesas,~~ ke C. K. decidos tute senpartie. Dankas al L. K. K. kaj al la Prez. de l' Kongreso, Prof. D-ro Dietterle.

Lia parolado kun konata elokventeco multe impresis al la kongresanaro kaj estas multe aplaŭdita.

Post li D-ro Ledermann nome de la L. K. K. dankas al ĉiuj kunhelpintoj, ĉefe al la prez., D-ro Dietterle kaj al la aro de komitatanoj ne mencieblaj ope. Esperplene la L. K. K. prenis sur sin la aranĝon de la kongreso. Multajn malfacilaĵojn ĝi devis forigi. La nekredeble malbonaj cirkonstancoj en Germanlando malebligis ĝis plej lasta minuto trankvilan laboron. Ankaŭ la politikaj cirkonstancoj estis tute malfavoraj. Pro tiu bedaŭrinda fakto francaj kaj belgaj samideanoj ne povas ĉeesti kaj ĝui la kongresaranĝojn. Se do ne ĉio estas tiel, kiel oni ĝin deziras, oni kontentiĝu, konsiderante, ke la L. K. K. ne preterpasigis eĉ etan eblon ĉion kiel plej eble igi perfekta. Entute la kongreso estas sukceso. Tiu fakto entuziasmigu nin por plua laboro.

Parolas poste D-ro Dietterle memorigante pri la mortintoj ne plu povante ĉeesti kaj kunhelpi al la sukceso de Esperanto. Antaŭ ĉio mankas nia Majstro, al kiu ni ŝuldas la ekziston de Esperanto. Por honorigi lin la kongresanaro leviĝas. Li memorigas pri la ĉiama akompanantino de l' Majstro, s-ino Klara Zamenhof, ĉeestanta la kongreson (aplaŭdego direktita al ŝia loĝio) kaj atentigas pri la tasko de la vivantoj. Ili laboru konscie, ne troigu la faktojn. Ni estas sur la vojo al la venko, sed ĝi ankoraŭ povos okazi eventuale eĉ nur post unu generacio. Se niaj nepoj foje ĝin akiros, ili estos benataj laŭ la konataj vortoj de nia Majstro. Ni solene promesu konscian laboron por la bono de nia afero, por la progreso de la homaro. — Je 12,30 h. D-ro Dietterle deklaras fermita la kongreson. Sub aplaŭdo oni kantas la himnon kaj la gekongresanoj disiras.

## Kunvenoj de Juristoj.

**3. aŭgusto 1923.**

Ĉeestas 22 personoj el 6 diversaj landoj;

S-o D-ro Orthal (Nürnberg) malfermis la kunsidon. Laŭ lia propono oni elektas kiel estraron de la kunveno: s-on Page (Edinburgh) prezidanto kaj s-on D-ron Lippmann (Leipzig) sekretario.

S-o Page faras enkondukan paroladon pri la utilo de internaciaj rilatoj per-Esperantaj inter la juristoj kaj raportas pri siaj spertoj en la iama Internacia Societo de Esperantistaj Juristoj Interalie li protestas kontraŭ bildo de Albrech Dürer, kiu montras la jursciencon kun azenoreloj kio tute ne konvenas por scienco tiel nobla ka utilega

S-o D-ro Lippmann faras paroladon pri la problemo de jura terminologio Esperanta. La internacieco de komerco, trafiko kaj politiko postulas internacian lingvon. La nuna jura terminaro Esperanta ne jam sufiĉas por la efektivaj bezonoj en tiuj ĉi fakoj.

La ellaborado de jurista vortaro en Esperanto estas tre malfacila. Ĝin povas fari nur pli bone — disdonante la partojn de la laboro — unuopaj juristoj sendepende, ol iuj komisionoj, kiuj devas esti internacie formitaj kaj tial laboras tre malrapide.

S-o Weiss (Friedland) proponas tuj disdoni inter la ĉeestantoj la laboron pri la specialaj fakoj de internacia juro.

D-ro Halbedl (Graz) proponas kreon de centrejo, kiu kontrolus juristajn verkojn ka tradukojn.

S-o Kav. Vaona (Verona) proponas elekti estraron de la Esperantista Jurista Unuiĝo, kiu prilaboras kaj la administrajn kaj la terminologiajn aferojn.

S-o D-ro Orthal avertas kontraŭ intermikso de organizaj kaj sciencaj taskoj.

S-o Page malrekomendas restarigon de la iama Internacia Societo de Esperantistaj Juristoj pro praktikaj malfacilaĵoj kaj parolas pri diversaj vojoj de internacia helpo juristoj inter juristoj. Li laŭtlegas detalan raporton verkitan de S-o Litauer (Warszawa) pri lia agado kiel sekretario de la jurista sekcio en la Internacia Scienca Asocio. — S-o D-ro Orthal legas leteron de s-o Litauer pri la estonta organizo de la Esperantistaj Juristoj. S-o D-ro Orthal rekomendas la Internacian Sciencan Revuon kaj rekomendas „Esperanto Triumfonta“ kaj „Esperanto“.

S-o D-ro Döhler (Riesa) postulas la juristan Sekcion pro ĝia ĝisnuna bona funkciado kaj parolas pri estonta organizo de la Internacia Scienca Asocio, precipe pri la intencitaj financaj aranĝoj inter la I. S. A. kaj ĝiaj sekcioj. —

En diskuto pri la demando, ĉu la juristoj restu sekcio de I. S. A. aŭ fondu nedependan societon parolas por la unua solvo, S-oj D-ro Halbedl kaj Page, por la dua S-o advokato Piño (Valencia).

Voĉdono rezultigas la decidon, ke la juristoj restu kiel ĝis nun organizataj **en faka Sekcio de la I. S. A.**

Post mallonga diskuto estas elektataj S-o Page kiel estro de la Jurista Sekcio de la I. S. A. kaj S-o Litauer kiel Sekretario.

S-o Page proponas, ke oni petu de UEA publikigon de listo de Esperantistaj juristoj kiuj povas helpi la membrojn de UEA en juristaj aferoj.

S-oj D-ro Austerlitz (Preŝov) kaj D-ro Lippmann rekomendas, ke UEA. havu specialajn „juristajn delegitojn“ por tiu ĉi celo.

S-o Page promesas labori en la komitato de UEA por efektiviĝo de la lasta propono kaj fermas la kunvenon.

## Kunveno de la instruistoj.

**5. aŭgusto 1923, 3—7 h.**

**Resuma raporto.**

Prezidanto: S-o Kaupper, Nürnberg
Vic-Prezidanto: S-o Degen, Leipzig
Sekretario: S-o Pollinger, Nürnberg

Honorsalutojn al
S-o Dr. Dietterle, Direktoro de la Germana Esperanta Instituto.
„ Dr. E. Privat, Genève.
„ G. van Heek, Hengelo.

I. Raporto de l' prez. pri la pedagogia situacio kaj klopodoj al organizacio.

II. La Internacia Instruista Konferenco decidas aliĝi al Edukista Internacio Paris post plenumo de l' kondiĉo de politika neŭtraleco.

III. La fakorgano estas Novaj Tempoj.

IV. Infangazeto: Esperantista Junularo estas rekomendate por ĉiuj infanoj kaj instruistoj. Kontraŭlaboro de infanoj kaj instruistoj estas petata kaj promesata.

V. Interŝanĝoj: La organizacia centro aranĝu oficejon, kiu peras la interŝanĝoj de korespondantaj intersenĵoj kaj personoj (infanoj-instruistoj).

VI. Ekspozicio de infanskribaĵoj riĉenhava.

VII. Por premiato de estontaj infanlaboroj oni elektis komisionon. (Estro S-o Scheibler, Freithal.) S-o van Heek favore donacis por aranĝo de la ekspozicio 20 h. G. kaj promesis 100 h. G. kiel premiojn por la infanoj.

VIII. Faka terminaro, daŭrigota en Novaj Tempoj.

IX. Pri sana historinstruo de angla instruistino.

X. Rezolucio al la registaroj tutmondaj — pri eduko al pacamo kaj homaro.

# Raporto de la Studenta Fakkunsido.

La 4. aŭgusto okazis la I-a studenta fakkunsido. Pro la malmulteco da ĉeestantoj oni elektas organizan komitaton, konsistantan el 3 kolegoj: s-oj M. Fenster (Berlin), Soltykevyĉ (Praha) kaj Herbst. Kaj poste prokrastas la kunvenon ĝis la sekvonta tago.

La dua studento kunsido okazas la 5. aŭgusto 1923. Ĉeestas 40 kolegoj. Kiel prezidanto estis elektita kol. Soltykevyĉ, sekretario M. Fenster. La kunsido havas la jenan tagordon:

1. Raporto pri la studenta Esperantista Movado en diversaj landoj,
2. Celo kaj organizo de la universala studenta asocio (statutoj)
3. Diversaĵoj.

Antaŭ ol komenci la tagordon kol. Fekete el Hungarujo, Soltykevyĉ kaj M. Fenster Berlin salutas la kunvenon en la nomo de siaj grupoj. Kelkaj samideanoj esprimas sian dubon pri la eblеco povi organizi la tutmondan studentaron; ili motivigas sian dubon per la spertoj de Praha kaj Helsinki. La hungaraj kol. plendas pri la malgranda disvastigo de Esperanto inter la studentaro. Pri la movado en Hungarujo ili sciigas, ke tie ekzistas grupoj, kiuj unuaj pritraktas Esperanton kiel nur lingvan demandon, aliaj flegas ankaŭ la internan ideon de Esperanto. La hung. kol. proponas organizi preparan komitaton, kiu konsistu el Centro kaj naciaj grupoj. Kol. Atanasov (Bulgarujo) opinias ke estas malutile fondigi specialan asocion kaj apogas la proponon de la hungaraj kol. Litova kol. Butkus sciigas pri la movado en Litovio kaj informas ke Esperanto estas enkondukita en la litova universitato dank' al s-o Medem. Kol. Weiss (Breslau), Lantos (Hungarujo) proponas organizi internacian moralan kaj materialan helpon por la kol., kiuj intencas studadi en fremdaj landoj. Plue parolas kol.: Gunĉev (Bulgarujo), f-ino Jung (Köln), Pechen (Budapest). Kol. Rosenvald Nürnberg proponas, ke oni aliĝu al la Internacia Scienca Asocio. Koncerne al la fondo de la asocio estas tri proponoj:

1. De kol. Paluzie (Barcelona) — organizi definitive la asocion.
2. Simila propono.
3. Starigi preparan komitaton por la organizado de la mondo.

Oni voĉdonadas la jenan rezolucion akceptitan:

1. La studenta kunsido dum la 15-a Kongreso de Esperanto decidas: fondi preparan komitaton, konsistantan el Centro kaj el naciaj delegitoj.
2. Peti kol. M. Fenster, Berlin, ke li petu la estraron de la Studenta Esperanto-Unuiĝo Berlin, ke ĝi akceptu la peton de la kunveno esti centro de la studenta movado, eventuale, ke kol. M. Fenster akceptu la taskon de la prezidanto de la prepara komitato.

Kiel naciajn delegitojn oni elektis por:
Aŭstrujo — kol. Mildwurf
Bulgarujo — kol. Gunĉev
Estonio —
Finlando — kol. Pantsar
Germanujo — kol. M. Fenster
Hungarujo — kol. Fekete
Litovio — kol. Butkus
Latvio — kol. Fridenberg
Polujo —
Hispanujo — kol. Paluzie
Svislando — kol. Hammer

Por aliaj landoj komisiis kelkajn kol. varbi delegitojn. Kiel organo de la studenta Esperantista movado oni unuvoĉe akceptis „Esperanto Triumfonta" Fine oni aranĝas kolekton por la Centro kiu donis 360 000 germanajn markojn. Kol. prezidanto Soltykevyĉ adiaŭas la konsidon per entuziasmaj vortoj kaj fermas la kunvenon.

# Kunsido de vegetaranoj.

La Vegetara Ligo Esperantista kunsidis lundon, la 6-an de aŭgusto, je la 9-a matene. Proksimume 120 personoj ĉeestis.

La ĝenerala sekretario-kasisto Oscar Bünemann (Hamburgo) malfermis la kunsidon, bonvenante la ĉeestantojn duoble samideanajn. Li konstatis, ke la ligo staras finance sur forta bazo; sed necese estas, ke ĉiuj restu fidelaj kaj varbu laŭeble novajn anojn. Li diris, ke la vegetaranoj estas la plej revoluciemaj personoj, ne politike; sed en ilia ĉiutaga agado kaj konduto ili volas porti la homan vivadon al pli alta nivelo. Ili laboras, por superfluigi sian propran agadon, volante vegetarigi la mondon. Finante sian bonvensaluton, li petis, ke la membroj pri multe individue partoprenu en la spirita vivo de la ligo.

S-o B. direktis specialan dankon al tiuj landaj sekretarioj, kiuj partoprenis vigle en la liga laboro, kaj li citis kelkajn nomojn. Al f-ino Noll (Kopenhago) li dankis pro ŝia detala raporto en „Vegetarano" pri la internacia kongreso en Stokholmo, kie ŝi prezentis la V. L. E. speciale invititan de la Internacia Vegetarana Unuiĝo.

S-o B. demandis, ĉu oni havas iun deziron pri pli ofta apero de la „Vegetarano". Li mem rekomendis la nunan kvaronjaran aperon pro tio, ke la bulteno ne enhavas aktualaĵon, sed celas nur spiritan refreŝigon. Neniu kontraŭdiris.

La konsista detala raporto estis disdonata maŝinskribita inter la ĉeestantoj aldone al la supraja raporto jam publikigita en la oficiala bulteno „Vegetarano". La kosto de la lasta numero superis la supozivan sumon; ĝi estis pli ol 2 000 000 markoj; sed la bonvolo de kelkaj anoj kovris ĝin kaj eĉ ebligis kasrezervon por pluaj numeroj.

La ligo nun havas pli ol 300 membrojn.

Post siaj raportoj s-o Bünemann transiris al la elekto de prezidanto, bedaŭrante la morton de nia tre ŝatata prezidanto, Sevenhuijsen, je kies memoro la ĉeestantoj leviĝis. Li proponis s-on Montagu C. Butler (Londono), akcentante la neceson, ke la prezidanto loĝu en Londono pro la tiea okazo de la proksima internacia vegetarana kongreso (1926).

S-o Butler afable akceptis.

S-o Bünemann citis estonan samideanon Aleksander Suia en Revalo (Tallinn), kiu pro rifuzo de militservo estis malliberigata. Li atentigis pri tio, ke la „Vegetarano" enhavas ĉiam porpacan rubrikon kaj forte apogas la pacifistan movadon. Per forta aplaŭdo la ĉeestantoj esprimis sian konsenton kun tio ĉi.

La nova prezidanto transprenis la prezidon kaj donis la parolon al la naciaj delegitoj por salutoj kaj raportoj. S-ino Isbrücker (Nederlando) alportis la saluton de gesinjoroj Roskes-Dirksen kun ilia danko pro la rubriko en „Vegetarano" pri la „Movado por Ĉasta Vivo". Ankaŭ de la Nederlanda Vegetara Ligo (prezidanto prof. Nolthenius s-ino Isbrücker alportis saluton kaj detalan interesan raporton, kiun ŝi laŭtlegis.

F-ino Margarethe Noll (Kopenhago) salutis de la Vegetara Ligo en Danujo kaj ĝia prezidanto, s-o Egerod, kaj raportis mallonge pri siaj impresoj dum la Stokholma kongreso, inter kies partoprenantoj ŝi sukcesis konstati la mankon de internacia lingvo. Esperanto estis permesata ĉe la kongreso.

S-o Bünemann laŭtlegis la salutleteron de rusaj vegetaranoj al la Stokholma vegetara kongreso, kaj oni decidis, sendi simpatisaluton al la rusaj samcelanoj.

D-o Hickel (Ĉeĥoslovakio) alportis saluton de vegetaranoj germanaj en sia lando. Por Estonio parolis f-ino Helmi Dresen. S-o Krestanov (Bulgarujo), jam forvojaĝinta, sendis leteran saluton. S-o Janko Todorov el Peŝtera (Bulgarujo) diris salutojn el sia lando.

Malfeliĉe la kunsido estis interrompata per la alveno de partoprenantoj por la kongresa dua labora kunsido, kiu okazis en la sama ĉambro. Pro la multaj aliaj aranĝoj de la kongreso, kiujn oni ne volas ĝeni, oni ne sukcesis, fiksi duan vegetaran kunsidon.

Oni decidis, sendi salutleterojn al s-o Saxon, Svedujo, kaj Prof. Nolthenius, Nederlando.

La vegetaranoj konstatis la bonan staton de la ligo kaj la bonan ordon ĉe la kunsido, ĉe kiu oni per antaŭaj preparoj evitis la longan kutiman diskuton pri organizaj demandoj.

La kunsido finiĝis je la 11-a.

# Protokolo de neoficiala Laborkunsido

**la 6. aŭg. en la ĝardeno de la kongresejo.**

Elektita prez: P. Nylén, sekr.: D-ro Takács. Ĉeestis 86 personoj.

Prez. Nylén deklaras, ke ĉar la II-a Laborkunsido okazis en malgranda ĉambro kaj multaj ne povis eniri jam, tial la laboremuloj kunvenis por priparoli gravajn demandojn. Iu samideano proponis voĉdoni malkonfidon al la LKK. Oni unuvoĉe malakceptis la proponon.

S-o Novlján (Zagreb) proponis, por certigi la unuecan elparolon de Esperanto, starigi Esperanto Universitaton. Laŭ Christaller (Stuttgart) la propono estas tre saĝa, sed nuntempe ne efektivigebla. Oni povus pli malkare solvi la aferon, farante fonografdiskojn de eminentaj Esperantistaj oratoroj. Drummond (Melbourne) deklaras, ke la aŭstralaj samideanoj jam proponis tion Nylén (Stockholm) opinias, ke la int. kongreso estas bona okazo por certigi la unuecan elparolon de nia lingvo. Post alparolo de Novlján oni unuvoĉe deklaris, ke

> la libera kunvena kunsido rekomendas al UEA pristudi la eblecon aranĝi someran, kelksemajnan, kvazaŭ Esperantistan Universitaton en konvena loko por plifaciligi la unuecan elparolon de nia lingvo.

D-ro Takács (Budapest) kontentigis la necesecon de fina aranĝo pri la kotizaĵo por niaj Centraj Organizaĵoj. Li laŭtlegis sian proponon:

> La XV a. Univ, Esp. Kongr. konsilas al la C. K. de K. R. ke ĝi kiel eble plej baldaŭ aranĝu la laŭ Helsinki'a decido, ke ĉe voĉdonado ĉiu nacia Repr. havu tion da voĉoj, por kiom da membroj la respektiva Soc. pagis. Provizore oni fiksu por bonvalutaj 1.00, por mezbonvalutaj 0.50, por malbonvalutaj 0.30 svisan frankon, aŭ la kvinfojon de eksterlanda leterafranko. Krome oni postulu de ĉiu Kongresano de Int. Esp. Kongr. krom la kongreskotizaĵo, Esperantujan imposton; de bonvalutoj 10.0, de mezbonvalutaj 5.0, de malbonvalutaj 2.00 svisajn frankojn po personoj. La tiel enpagitaj sumoj estos dividitaj jene: 3/5 po C. K de K. R; 2/5 po UEA.

D-ro Takács proponis jam nun priparoli la elektotan urbon por la XVI-a. Li proponis Sofion, ĉar estus dezirinda komenci propagandon sur la Balkano. Novlján proponis Wien'on, ĉar en Bulgarujo la politikaj cirkonstancoj ne estas certaj.

Ĉar la tempo jam tre antaŭeniris oni finis la diskutadon.

*D-ro Takács Jozefo* sekr. de kunsido.
*Paŭlo Nylén* prez. de kunveno.

# La Pacifista Kunveno.

**4. aŭgusto 1923.**

Preparan kunsidon ĉeestis la komitatanoj elektitaj en la XIV-a en Helsinki, 1922.

Malfermis la grandan kunvenon f-ino Doktoro Steiklemacher en la nomo de la Nacia Germana Pacifista Ligo (Kartelo) salutante bonvenon al la 15-a Kongreso. Ŝi alvokis nin el ĉiuj naciaj serĉi la kaŭzojn de suferoj nuntempaj. Inviton oni donas al la Germana Pacifista Kunveno en la Lehrerheim (kie poste parolis reprezentantoj de diversaj nacioj, donante al tiu demonstracio „Neniam-plu-milito" grandan eksterlandan inspiron kaj kuraĝigon laŭ la opinio de la Doktoro).

Kiel prezidanton oni elektis Lian Moŝton Prelaton D-ro Alexander Giesswein el Hungarujo. Akceptante la oficon konvenan — ankaŭ por la estonta jaro — li rememorigas ke en la Esperantismo estas la sama paca celo kiun ni havas Li bedaŭras ke la Francaj kaj Belgaj samideanoj ne ankaŭ venis al la Kongreso, kvankam ĉi tiu malfeliĉo ne estis laŭ la volo de la Esperantistaro Nürnberga, sed pro tio ke la ne-Esperantistaj hotelestroj ktp. ne povis doni al ili ĉambrojn: ni rigardas ilin kiel fratoj (multan aplaŭdon) kaj ne devas intermiksi la popolojn kun la registaroj.

Salutojn alvenintajn al la kunveno oni prezentis; interalie de diversaj filioj naciaj de la Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libereco, la Internacia Movado por Forigi la Militon (Internacionalo de Kontraŭmilitistoj, absolutpacifistaj), la Senarmiga Movado „Nova Jerusalemo" el Praha, la Brita „Peace Council" (Nacia Konsilaro de Pacaj Asocioj), salutan leteron sendis Alexander Suija, Estlanda samideano rifuzante servi en la armeo, kaj tial nun malliberigita kaj juĝota, dezirante sukceson al la laboroj de gesamideanoj kontraŭ tiu malamiko de kulturo kaj evoluado.

La sekretario raportis pri la sekvinta jara laboro kaj priparolis la broŝureton „Antaŭen! Al Universala Paco", enhavante statistikojn el kelkai landoj pri la pacifista kontraŭmilita laboro, la bazo de la Internacia Movado por forigi la militon, kaj artikolo kontraŭ la perforto. Ŝi bedaŭris, ke ĝi ne ankaŭ enhavis la kolekton de S-o Selinheimo el Helsinki kiu, laŭ la decido de la lasta komitata kunsido 1922, kolektis statistikojn: verŝajne la korespondado pri ĉi tia afero ne atingis lin. Poste sekvos pli taŭga kompleta eldono.

S-ino Julie Isbrücker el Holando, la en Helsinki elektita Vic-prezidanto, klarigis la decidon de la lasta pacifista kunveno kaj proponis laboremajn naciajn delegitojn anstataŭigontajn la antaŭan malgrandan komitaton. Laŭ ŝia propono ankaŭ foriĝis pro manko de tempo, la raportoj de naciaj kaj internaciaj delegitoj el ĉiuflankaj pacifistaj kontraŭmilitistaj asocioj.

Kiel sekretarion internacian por la estonta jaro la kunveno ankoraŭ elektis f-inon Mary Riley el Anglujo, kaj akceptis s-o Julius Glück el Germanujo kiel kasiston.

Denove la Esperanta pacifista laboro estas starigita laŭ la volo de la preskaŭ 300 kongresanoj ĉeestantaj la kunvenon, sub la nomo „Universala Esperanta Pacifista Ligo". Diversaj samideanoj sindone proponis siajn servojn kiel naciaj delegitoj. Samlandanoj kiuj volas helpi kiel subdelegitoj en la ĉefaj urboj kaj regionoj estas petataj bonvole skribi al la ĉefdelegito. En la sekvantaj landoj mankas ankoraŭ delegitoj: Kanado, Sudafriko, Orient-, Okcident-, Nord-Afriko, Sudameriko, Hindujo, Ĥinujo, Nova Zelando, Okzidenta, Azio, Turkujo, Rusujo. ktp. Pacifistoj en ĉi tiuj lokoj, kiuj povas helpi eĉ iomete afable sendu la nomojn ktp. al la internacia sekretario. Jen la delegitara adresaro:

Honora Prezidanto:
S-ino Vidvino Zamenhof.

**Delegitaro.**

| | | |
|---|---|---|
| **Prezidanto** | | |
| Hungarujo | Prelato D-ro Alexander Giesswein | Szentkiralyi-utca 28, Budapest VII |
| **Kasisto** | | |
| Germanujo | Direktoro Julius Glück | Berlin, Bayreutherstr. 3 |
| **Sekretario** | | |
| Anglujo | F-ino Mary Riley | Apude Harrogate, Yorkshire, The School House, Clifton-cum-Norwood |
| **Lando** | **Nomo** | **Adreso** |
| Ĉefdelegitoj nacial | | |
| Anglujo | S-ino Moscheles | London, 84, Fellows Road. N. W. |
| Armenujo | S-ino Bozajzon | en London, 46, Grove End Road St. Johns Wood, N. W. 8 |
| Australio | Ge-soj Drummond | Melbourne Eeast, „Coniston". 117, George Street. |
| Aŭstrujo | S-ro Rudolf Frey | Wien, III, Bechardgasse 14 |
| Bulgario | S-ro Profesoro Ivan Krestanoff | (nun en konsuleja sekretario) Dresden A. 16, Germanujo |
| Ĉeĥoslovakio | S-ro Konstantin Koutch | Praha, Rybna Ul. II. B. |
| Danlando | F-ino Margarete Noll | København, Fredericiagasse 6 |
| Estonio | F-ino Helmi Dresen | Tallinn, Postkast 6 |

| Lando | Nomo | Adreso |
|---|---|---|
| Finlando | S-o Aarne Setinheimo | Helsinki, Konstantinastr. 25 |
| Francujo | S-o Gabriel Chavet | Paris XVIII, Rue Coulaincourt 57 |
| Germanujo | S-ino Pfister-Wolter | Nürnberg, Baaderstr. 17 |
| Hispanujo | S-o Alberto Diaz | Portugalete apud Bilbao, Viscaya, Sotrata General Castanos 18-3 |
| Holando | S-ino Julie Isbrücker Hago, | van Beveringkstr. 10 |
| Hungarujo | S-ino Korma | Budapest VI, Andrassy ut. 5 |
| Italujo | Pastro Hanna Rotondo | Bari, Mazzini 75 |
| Japanujo | S-o S. Otsuki | Tokio, Ministerio Fervoja de Japanujo |
| Latvio | S-o Edgaro Grot | Riga, Nikolaja aela 41 |
| Litovio | S-o Linda Alseika | Birzai. |
| Norvegujo | S-o H. Bonnevie | Kristiania, Bergallengate 11 |
| Polujo | S-ino Stella Esslgman | Varsovio, Str. Marŝalkovska 130 |
| Svedujo | S-ino Signe Boström | Gävle, S. Centralgatan 38 |
| Svislando | F-ino Mario v. Pees | Chalet Bertha, Wilderswil |
| U. S. A. | S-o Frank Stephens | Arden, Delaware |

Diversaj proponoj kaj diskutoj sekvis pri la plej taŭga bazo por la firma starigo de la Ligo; Jenaj decidoj estas faritaj.

**I. Celo de la Universala Esperanto Pacifista Ligo:**

1. Disvastigi Esperanton inter la Pacifistoj;

2. Disvastigi Pacifismon inter la Esperantistoj;

3. Varbi membrojn aŭ nacian societon pacifistan Esperantan por la internacia ligo;

4. Praktike internacia labori por mondpaco;

5. Raporti ĉiujare dum la Univ. K. d. E. pri la diversmanierai laboroj kontraŭ la milito en siaj regionoj kaj per tio diskonigi la plej bonajn kaj novajn rimedojn;

6 Klopodi starigi Esperantistain sekciojn en naciaj pacifistaj societoj, kunligante ilin poste kiel unu en nacia asocio.

Tiun ĉi laboron gvidas la naciaj ĉefdelegitoj, kiu laŭ regionaj ĉirkonstancoj havas la liberecon laŭvole organizi la Esperantistan pacifistan movadon en sia regiono.

**II. Aliĝo:**

La Universala Esperanta Pacifista Ligo aliĝu al la centra oficejo en Berne: „Bureau Internationale de la Paix“

**III. Praktika Laboro:**

1. Ĉiuj ĉefdelegitoj kaj subdelegitoj aranĝu en pacifistaj rondoj paroladojn pri Esperanto;

2. Maisame kiel sub paroladoj pri pacifismo en Esperantaj rondoj;

3. Dum la gravaj naciaj manifestacioj, la Esperantistaj pacifistoj partoprenu en tiu maniero, ke la ne-Esperantistoj eksciu pri la grava rolo de Esperanto kiel plej taŭga rimedo por la mondpaco;

4. Disvastigi flugfoliojn klarigante la celon de la Ligo; inviiu delegitojn el ĉiuflankaj naciaj pacifistaj kontraŭmilitaj asocioj, fariĝonte unu granda nacia Esperanta pacifista kunveno dum la estonta jaro, interkonsente farante precizan rezolucion aŭ raporton pri la plej taŭgaj rimedoj kontraŭ la militoj, — interalie ĉefe en Esperanto.

5. Ĉiuj delegitoj, almenaŭ dumonate raportu pri la laboro kaj la stato de la movado en sia regiono por oficiala sciigo en la Esp. gazetoj.

6. La Estraro almenaŭ kvaron-jare elsendu raportojn pri la stato kaj laboro de la Ligo al ĉiuj delegitoj

7. Delegitoj raportu pri la laboro de la Ligo en la naciaj pacifistaj gazetoj kaj laŭeble en la ĉiutaga kaj faka gazetaro;

**IV. Kotizo:**

Ĉiuj delegitoj libervole kolektu kotizajon 1) por al la kasisto; 2) por la bezonoj de sia nacia laboro.

**V. Oficialaj Sciigoj:**

aperos en 1) „Esperanto“ de UEA; 2) „Esperanto Triumfonta“; 3) naciaj Esperantistaj gazetoj; 4) diversaj faka Esperantistaj gazetoj.

La oficiala reprezentanto de l'Brita Sekcio de Internacia Movado por forigi la Militon, — S-o Wilfrid Appleby, — proponis ke la kunveno subtenu la sekvantan deklaracion de la ĉiuspra movado, (antaŭe aprobita de la Pacifista kunveno en Praha, XIII a)

„Kredante ke ĉiu milito estas malprava kaj ke la armado de la popoloj ĉu mare, tere, aŭ aere, estas perfido kontraŭ la spirita unueco kaj inteligento de la homaro, ĝi instigas la tutan Esperantistaron decidi neniam partopreni en milito, internacia ĉu civila ĉu portante armilojn, fabrikante aŭ transportante municion, memvole kotizante al milito prunto aŭ uzante ties laboron kun la celo liberigi aliain por milita servo.“ Sed, laŭ opinio de la prezidanto kaj kelkaj aliaj jen estis tro grava afero por ĝenerala kunvena subteno nuntempe, kaj oni lasis ĝin al individua subteno poste. Tamen, unuanime la kunveno ŝubtenis la pluan aldonon al la proponita rezolucio:

„La Pacifisto Faka Kunveno, en la XV-a K. d. E. en Nürnberg, 1923, deklaras sian kredon, ke la sola vojo al la mondpaco estas la universala frateco kies atingo per la komuna uzado de la helplingvo Esperanto faciliĝas kaj instigas ĉiuin Esperantistojn subteni la mondpacan ideon,

Post kantado de la himno la kunsido estas fermita.

# Protestanta Diservo.

Precipe bela kaj impresa estis la protestanta diservo en la malnova preĝejo de Sta. Sebaldus. Solene sonoris la ĥoro de la seminaristoj el Auerbach kaj la kantado de la partoprenintoj. La arion el la Oratorium Josua estas prezentita de f-ino. Lotte Keilig el Auerbach, kies sonorilklara voĉo meritas specialan laŭdon. La prediko de l' superind. D-o Kühn, Auerbach pri la teksto: „Altentenigu nin neklinîĝe la konfeson de nia espero“ plifortigis la solenan atmosferon, tiel, ke la aŭskultantaro ege kontente povis disiri.

# Eniro de la surdmutuloj en la Esperanto-mondon.

Je la 13 majo ĉi-jara dum surdmutula festo en Bonn a. Rejno laŭ propono de la festparolanto s-o d-o Rikardo Rung kun ĝenerala aplaŭdo estas akceptita rezolucio, ke oni enkonduku ankaŭ la surdmutulojn en la Esperantomondon. Per tio ĉi la surdmutulo kies gestolingvo estas nur neperfekta helpilo, povus tute plene partopreni la mondkultur-bonajojn, simile al la blinda Esperantisto.

# Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novajo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

# Landoj.

## Anglujo.

### Esperanta demonstracio en London.

Lastajn vendredon kaj sabaton okazis granda ĝardena festo aranĝita de la Londona asocio de Ligo de Nacioj. Ĉar unu el la celoj de la festo estis montri la diversajn popolojn, kiuj akceptas la idealojn de la Ligo de Nacioj oni invitis la Esperantistojn partopreni.

Du-tri mil personoj ĉeestis la feston en la vastaj belegaj ĝardenoj en privata parto de „Regent's Park“, kaj ĝuis la multajn demonstraciojn kaj koncertojn de anoj de diversaj nacioj. Kvar koncertoj Esperantaj estis aranĝitaj de S-ino Moscheles kaj aliaj gesamideanoj, helpis kantistinoj Louise Gérad Dorothy Gray, Rosa Maude kaj internacie konata humoristo, nia samideano Harrison Hill, deklamoj el la verkoj de Shakespeare, Heine kaj Privat estas faritaj de Gesinjoroj Goodall, Cameron, kaj dekjara Sinjoreto Spiller.

Profesoro Gilbert Murray L. L. D., D. Litt., F. B. A. Estro de la agada komitato de la Unuiĝo de la Ligo de Nacioj prezidis la unuan koncerton, kaj diris trafajn vortojn pri la utilo de Esperanto por la Ligo. En la horo estis pli ol 50 gesamideanoj kiuj vestis sin laŭ maniero armenia, finlanda, franca, hispana, holanda, kimra, rusa, sveda, tirolia, k. t. p. Vagante tra la ĝardenoj procesie oni fotografis ilin por montri ilin poste en la lumbild-teatroj.

Dum la vespero la propagandemuloj staris en „rondo familia“ kaj faris paroladetojn pri la help-lingvo; multe da intereso montris la aŭskultantaro kiam estis videble, ke la Esperantistoj vere komprenas unu la alian kaj ke la lingvo estas vivanta lingvo kaj ne estas nur projekto. Budo por libroj, gazetoj, k. t. p. troviĝis en la ĝardeno, kie F-ino Roche energie disdonis folietojn kaj faris klarigojn al la multaj vizitantoj.

## Ĉeĥoslovakio.

### Bohemio

En Jibka okazis, de 21./7. — 30/7. kurso pri hejmscienco, kiun gvidis sinjorino H. Böhnisch kaj s-o J. Mühlberger, kiu samtempe estas la estro de la germana „Jungvolk“ en Trautenaŭ La kurson partoprenis personoj el diversaj german-bohemaj urboj. La gvidanto, favore disponis al sam. Bruno Gahler el Trautenau, kiu ankaŭ partoprenis la kurson, unu horon al la semajna instrua tempo por paroladi pri Esperanto. S-o Gabler parolis pri „Esperanto kaj la Germanoj“, kelkaj interesiĝis kaj promesis lerni la lingvon.

Fine li disdonis Esperanto-varbfoliojn kaj broŝurojn de de la Reichenberga foiro.

## Francujo.

En la Kongreso de „Association Française pour l'Avancement des Sciences“ (Franca Asocio por Prosperigo de la Sciencoj), kiu okazis en Bordeaux de la 30. julio ĝis la 4. aŭgusto, komunikajoj rilatoj el Esperanto estis al la Lingva Fako prezentataj de s-oj Rollet de l'Isle, Baudet, Moissenet, Flageul, kaj favore akceptataj.

Plie, la Esperanta Grupo de Bordeaux invitis la kongresanojn al parolado de s-o Rollet de l'Isle pri „Esperanto kaj la Internacia Scienca Kunlaborado“. Ĉeestis tiun kunvenon s-o Desgrez, prezidanto de la kongreso kaj s-o Depoin, prezidanto de la Lingva Fako.

## Italujo.

### Niaj novaj grupoj.

Dimanĉon, la 17-an de junio, okazis solena inaŭguracio de loka grupo sub direkcio de nelacigebla samideano d-ro Vito de Benedetto. La festo estis en la Teknika Reĝa Lernejo kun ĉeesto de multenombra publiko, aŭtoritatoj ktp —

Meze de granda kaj bela grupo de gejunuloj estis flirtala granda verda standardo, ĉe la tablo de la direktoro.

Post interesa konvinkiga parolado de Prof. de Benedetto, oni legis inter aplaŭdoj telegram-salutojn de FEIestraro kaj de multaj esperantaj italaj grupoj. —

Pastro Kav. Agrimi benis kun taŭgaj paroloj la grupan flagon.

Sekvis recitado de ses admirindaj poeziajoj tre lerte prezentataj de diversaj gelernintoj de E-kursoj ĉi-jaraj.

Aŭtoritatoj kaj publiko pasis poste en la Desegnejo kie estis elmontro de E. gazetaro (pli ol 500 tipoj el 36 nacioj), filatelio kaj paper-mon-ârto tutmonda. —

La praktikaj efikoj de esperanto kaj la lerta prezentado de motivoj, faktoj kaj ekzemploj pri ĉia aspekto de la E. problemo treege interesigis la eminentan kaj multenombran publikon. Loka gazetaro longe kaj favore raportis.

## Rumanujo

Sub la alta patroneco de lia Moŝto Carol Kronprinco de Rumanio, sub la protekto de S-o D-ro C. Angelescu Ministro de Publ. Instruado.

S-o C. Banu, Ministro de l' Kultoj kaj Artoj kaj sub la honora prezido de S-o C. Gavanescul generalo, Komandanto de la Divizio de Banat en Timiŝoara de 27. — 30./7. okazis la 3 a Rumania Esperanto Kongreso.

La kongreso reorganizis la Rumanian Esperanto-Societon.

La franca konsulo de Timiŝoara salutis la kongreson per letero Esperantlingva. Ankaŭ la germana konsulo salutis

Partoprenis ĉirkaŭ 500 samideanoj, inter iii 120 bulgaroj, pluraj, turkoj, armenoj, krom rumanoj, hungaroj kaj germanoj.

Ne ricevinte pli detalan raporton ni rapidas sciigi la ĉefe diskonigajn faktojn.

## Rusujo.

### Barnaul.

Dum du monatoj okazis 7 dimanĉaj kunvenoj, kiujn vizitis entute 46 personoj.

Forveturis el urbo al ekskurso grupo de esperantistoj en lernejo de tria internacionalo.

Prezidanton de grupo A. S. Petrov oni elektis kie reprezentanton de grupo por tutrusianda kongreso, ankaŭ por la XV. Universala Kongreso de E-o.

Frapis malfeliĉegon nian grupon dum Altaja ekskurso, Dronis en rivero Katuni esperantisto, estro de grupo Junaj Pioniroj: Harnarado Osipov.

## Japanujo.

Amaki (Fukuoka-ken). — De majo 12. Asakura liceo donas mezgrandan kurson por fininto) de la elementa kurso, kiu estis donata de marto; la gvidanto estas prof. Hirata Po du horoj ĉiusabate; 20 l.

MACUZAKA (Mie-ken). — Kun plezuro mi raportas al vi ke en Macuzaka nia afero iom post iom progresas. En Macuzaka komerca lernejo studentoj 4-jarklasaj (S-ro. Uĉijama kaj S-ro Jeno-moto) gvidis kurson por plijunaj studentoj, de la 16-a ĝis la 24-a de Majo sub mia helpgvido. Ĉirkaŭ 70 studentoj ĉeestis ĉe la kurso. Atendante la fervoran propagandadon okaze de la pleniĝa ceremonio de nia lernejo (5, 6, kaj 7-an de Junio.

KOREO (ĈOOSEN). — Nove fondiĝis jenaj grupoj en la lando:

Fuzan Komera Verda stelo.
Jinsen Esperanto Grupo.
Heijoo Esperanto Grupo.
Ĉinnanpo Esperanto Grupo.

DAIREN (Darnio). — Jus fondiĝis Dairen Esperanto Grupo.

TOTTORI. — Okazis vere sukcesa propaganda kunveno, ĉe kiu parolis S-ro Ujaku Akita el Tokio kaj aliaj.

# Komerco.

### Aŭtuna foiro de Frankfurt a. M.

Interne de la foira kvartalo en Frankfurt a. M. nova vico da kompletigaj foirdomoj estas jus konstruata por la Aŭtuna Foiro, okazonta de l' 23.—29. septembro nunjara. En plejproksima konekto al la domo „Ŝuoj kaj ledoj“ nova vastspaca halo ekestiĝas kun la celo enigi la firmaojn de la ŝu-maŝina industrio. Kiel parto de la teksa foiro de Frankfurt unuafoje kompleta en si mem grupo „Sinjora Modo“ estos reprezentata. Por ĝi oni preparas la necesajn lokojn en la grandaj orientaj haloj A. kaj B. Ĉiujn informojn volonte sendas Messamt Esperanto-fako, Frankfurt a. M.

La foira oficejo samtempe atentigas pri la jus aperinta „Provizora Katalogo“ kun klarigoj en pluraj lingvoj kaj en Esperanto. Ĝi estas senpage havebla. Karto (neilustrita!) sufiĉas por havigi ĝin. — Samtempe oni informas nin, ke la vendo de la dulingva broŝuro pri Venezia jus komencis. Komparu pri tio la noton en ET 151 (a).

# Gravaj sekvoj de la Konferenco de Venezia.

Ĉe la Konferenco de Venezia, s-o Charles H. Edmonds reprezentis la Ĉambron de Komerco de London. Lia Raporto estas unuanime akceptita de la Komerca Edukada Komitato de la Ĉambro la 22. junio 1923.

Sekve de la raporto, stariĝis Komitato nomata Brita Komitato por Internacia Lingvo, kiu konsistas el delegitoj de diversaj gravaj britaj komercaj organizajoj. La celoj de la Komitato estas:

1-e. Oficiale dissendi la Raporton al Komercaj Asocioj tra la mondo (laŭ deziro de la Konferenco de Venezia) petante rezoluciojn aŭ opiniojn. La respondojn la Komitato submetos kun la raporto pri Venezia al Konferenco de gravaj britaj komercistoj en London pli poste.

2-e. Organizi internacian eksperimenton pri la instruado de Esperanto al komercistoj diverslandaj sub oficialaj aŭspicioj (ankaŭ laŭ deziro de la Konferenco de Venezia). Por fari la unuajn aranĝojn la Komitato intencas kunvoki delegitojn de esperantistaj naciaj asocioj al prepara konferenco por internacia eksperimento pri la instruado de Esperanto en Paris dum januaro 1924.

La sekretario de la komitato estas s-o Edmonds, kiu reprezentas en ĝi la Ĉambron de Komerco de London. La komitato baldaŭ dissendos oficialajn komunikojn.

# Tekniko.

### La ksilotermo.

Tiu aparato, bazita sur la principo de la gasogeno, havigas, kiel unuan profiton, la utiligon de ĉiuj kemiaj reakcioj devenantaj de la grada varmigo de la ajn hejtajo. La malforteenergia gaso, tiel liberigita, brulas interne de la aparato kaj spirale lameniĝas inter la metalaj flankoj de la supra parto, kie ĝi lasas sian tutan termogradon por profito al la bezonata hejto. Tiel la aparato en plena funkciado donas al la suneraj partoj ĉirkaŭe 450 gradojn, dum la eliĝantaj gasoj en la kameno tiam estas nur je 25 aŭ 30 gradoj. Ĝia te mpoprodukto por la sama kvanto da hejtajo estas ĉirkaŭ la 60-obla de iu ajn hejtaparato.

Oni ŝargas la aparaton per 7 kilogramoj da lignaj ruboj, segajoj, ĉifonoj, paperajoj k a. Tiu ŝargo daŭras 48 horojn modere subtenita, 24 horojn alternita kaj 16 en plena iro. Ĝi estas kalkulita por la hejto de cent kubmetroj.

La temperaturo modere subtenata estas 85° ĉirkaŭe kaj tute sufiĉas por daŭrigi en sama mezvarmo loĝejon da tri aŭ kvar ĉambroj. La reguligo fariĝas per reguligilo, kiu modifas la kvanton da aero enlasita en la forbrulo de la gasoj. De 85° la aparato pasas, en kelkaj minutoj, al 450°, kaj precipe el tiu reguligo rezultas la multaj uzoj, por kiuj taŭgas la ksilotermo:

1-e por hejto en loĝejo; unu sola ŝargo sufiĉas por 24 horoj sen ia subteno; 2-e por hejto en kuirejo; malgranda ŝargo por 24 horoj, ĉiam kun modera flamo, escepte dum la kuiro, kiam la aparato funkcias nur duonire; 3-e por vaporkaldronego de motoraj maŝinoj kai por kaldronego de centra hejto.

La dimensioj de la aparato estas: alte 1 metro, diametre 50 centimetroj; ĝia pezo: 25 kg La ksilotermo estas tre facile transportebla; en kelkaj minutoj oni povas alĝustigi ĝin al iu kameno.

*U.*

(Laŭ „L'Usine“).

# Reala Helpo.

La Brita Ligo de Esperantistoj Socialistoj skibis al ni:

Tre interesa estas la internacia peno rekonstrui industrion rusan. Ĉu oni konsentas kun la idealoj kaj metodoj de la nuna registaro tiea aŭ ne, oni devas admiri la penojn nutri kaj eduki la infanojn, venki la malsategon kaj fine funkciigi denove industrion rusan. En ĉiu parto de la globo laboristoj helpas per la sendado de nutraĵo, maŝinoj k. t. p. Stariĝis ankaŭ Prunto.

La adreson de la brita oficejo oni povas legi en la anonco sur paĝo 4-a de la hodiaŭa numero.

# Alvokoj.

### Peradlejoj por korespondaĵoj de infanoj.

La distrikta grupo Auerbach i. V. de Esperantistaj instruistoj decidis fondi institucion por vigligo de la infankorespondado. Ĝi estas kolektejo, de kie la eksterlandaj poŝtaĵoj estas transdonataj al saminteresataj klasoj aŭ unuopaj infanoj, provizore en Saksujo. Ambaŭflanke profito estas garantiebla pli multe ol se klasoj aŭ infanoj kun samaj interesoj serĉas kaj ne trovas rilatojn. La helpemaj kaj malegoistaj kolegoj de la entreprenanta grupo zorgos pri bona funkciado de la nova institucio. Ili do petas eksterlandajn kolegojn instruantajn Esperanton al infanoj, sendi la adresojn de serioze korespondemaj infanoj, sciigante samtempe ties dezirojn, al kolego Richard Pfütze, instruisto, Feldstr. 18, Falkenstein i. Vogtl., Germanio.

Kolegoj intencantaj fondi samajn kolekt- kaj transsendejojn bonvolu skribi vian adreson.

## Negocaj informoj.

### Wilhelm Busch Maks kaj Moric.

Oni informas nin, ke post ne longe aperu Espo. traduko de la verko Maks kaj Moric de l' fame konata germana humorista poeto kaj samgenia ilustristo Wilhelm Busch. La traduko estas rimarkinda pliriĉigo de nia Esp. literaturo. La libro, jam tradukita en anglan, svedan, hispanan, rusan, portugalan kaj danan lingvojn sendube vekos grandan intereson inter la Esperantistaro. Antaŭmendo de la libro estas treeg[illegible] rekomendinda. Eldonistoj estas: Braun & Schneider, München, Maximiliansplatz 11. N[illegible] aldonas ankoraŭ, ke la intereso de la eldonejo pri Esperanto pligrandigas la liston de seriozaj interesatoj-firmaoj. La entrepreno estas samtempe eldonejo de la mondkonataj „Fliegende Blätter" (Flugantaj folioj).

# Parolejo.

### Slavaj radikoj en Esperanto.

(Rilatas al 185).

Prof. L. Kronenberg citas el la Universala Vortaro la radikvortojn, devenantajn el pola lingvo: ĉerpi, bulko, kolbaso, vi, sama, pro, pra kaj ul. Sed la vortoj krom la lasta estas ne nur polaj, sed ankaŭ rusaj, — do, ni diru, komun-slavaj. Mi povas aldoni ankoraŭ jenajn slavdevenajn vortojn en Esperanto: Barĉo, bolto, brovo, caro, celi, ĉapo, domo, gladi, kaĉo, karaso, kartavi, klopodi, kopeko, krano, kreno, krom, kruta, kukolo, latuno, levkojo, (lulilo ruse lulka), luno, malakito, nepre, nova, paŝti, pavo, ploto, plugi (plugilo ruse plug), prava, roso, semo, sevrugo, sidi, stepo, sterleto, svati, ŝovi, tri, vino, vidi, vosto (ruse ĥvost).

Certe, kelkaj el la cititaj vortoj (ekzemple: domo, kukolo, luno, nova, semo, sidi, tri, vino, vidi) ekzistas ankaŭ en aliaj lingvoj, romanaj aŭ germanaj; tamen en la rusa ili ne estas ĉerpitaj el tiuj lastaj, sed ili devenas el iu komuna pralingva fonto. *D-ro Andreo Fiŝer* (Tiflis).

# Gazetaro.

### Esperanta.

Katolika Mondo (kun aldono Revuo Katolika), Graz, junio-julio, tre interesa por aktivaj katolikoj.
La Suda Kruco, Melbourne, n-o 34—35, 10. 5., n-o 36, 10. 6., Pri la 5-a Aŭstr. Esp. Kongr., detala angla raporto pri Venezia.
La Federacio de la Mondo, Fremantle, Aŭstralio, n-o 2, julio, propagandas la „Unismo'n".
Revuo Orienta, Tokio, junio, atentinda kroniko.
Germana Esperantisto, Berlin S. W. 61, aŭgust. — sept. duobla kajero.
Holanda Esperantisto, Zutphen, n-o 82, 28. 7., n-o 83, 4. 8. n-o 84, 11. 8.
Sennacieca Revuo, Paris XI., aŭg., sept., tre leginda por socialistoj ktp. Riĉa enhavo. Sub „Diskutejo" longa artikolo kontraŭ trouzo de neologismoj.
Konkordo, Zagreb, julio.
T. E. K. A., Lille. aŭgusto, pri la teknika vortaro medicina.
Literatura Mondo, Budapest, julio, kiel kutime tre artiste aranĝita.
Esperanto Ligilo. Stockholm, julio, blindula organo tutmonda.
Por la Indiĝenoj. Genève, julio, Esp. bulteno de la Intern. Oficejo por la Protektado de la Indiĝenoj.
Ukraina Sielo, Stanislavovo, julio, kun plejparte literatura enhavo.
La Nova Epoko, Moskva, aprilo—junio, tre aktuala kaj interesa.
La Lumturo, Bremen, n-o 1, nova gazeto Esperanta politi[illegible].
Der Arbeiter Esperantist, Berlin N. 37, aŭgusto, of. orga[illegible] de la labor. Esp. Asocio por germanl. regn.
France-Esperanto, Paris 9e., julio, i. a Esperanto en la praktiko.
Tra la Literaturo, Dresden 96, julio—sept., i. a. rimark. esprimoj. uzitaj de Zamenhof en „Rabistoj".
Esperantský Zpravodaj, Praha II, julio, Esp. raportanto por ĉeĥoj.
Novaj Tempoj, Paris XIV, julio.
Hungara Esperantisto, Szeged, julio.
Marto, Haida. julio. tre impresa Dürer-numero okaze de la XV-a.
Der Bund, Frankfurt a. M., 28. 7, organo de la foiro de Fr. kun dulingva ĉefartikolo tre grava germ. kaj Esp. okaze de la XV-a. (Senpagaj numeroj haveblaj de Messamt, Espo. Fako, Frankfurt a. M.)
O Jornal, Rio de Janeiro, Lit. traduko el ET.
L'Action Syndicale. Perpignan, art. Lernu Esperanton!
L'Ere Nouvelle 25. 7., E.-rubriko.

### Nacilingva.

The Open Road, London, S. W. 1, aŭgusto, kun Esp. angulo.
Latwijas Sargs. Riga, 26. 7., pri ital. regist., itala reĝo kaj Esperanto.
R.O.M.A.-S.A.L.U.S., Roma 30, n-oj 1—7, kun notoj en Esperanto. Imitinda de aliaj gazetoj!
Reichenberger Zeitung, Reichenberg, 25. 7, du artik. pri Nürnberg, 28. 7., pri Venezia.
Päewaleht, Tallinn, 27. 7., pri Nürnberg, 28. 7. pri Lit. Mondo, 10. 7. feliet. prop. artik. pri E.
Le Libertaire, Paris, 20. 7., pri SAT.
L'Humanité, Paris, 23. 7., pri SAT kaj SAT-kongreso.
Reichenberger Zeitung, Reichenberg. 4. 8., pri malfermo de l' XVa., 5. 8., pri malf. kuns. kaj Dürerdemonstracio.
Der Bund, Bern, 7. 8., pri malaprobo de E. per la intel. komis. de L. d. N.
Jugoslavenski, Zagreb, 22. 7.—8. 8., kun notoj pri E. i. a. pri jugosl. E. kongr.
Słowo, Radom, (Pol.). 25. 7., feliet. pri E.
Agrupacion Escultsta, Barcelona, no. 49, kun bulg. enigmoj trad. el E.
Tages-Anzeiger, Zürich, 12. 7., pri Albanio kun mencio de ET.
L'Index, Paris, aŭgusto, kun titoloj diverslingv. kaj en E.
Il Giornale, Mantova. 18. 7., E. kaj la registaro.
New Yersey Post, Town of Union, 22. 7., det. art. pri 16-a Amerik. Esp. Kongr.
Messezeitung, Reichenberg, julio, pri la peresp. prop. servo de la foiro de R.
Jugoslavenska Reklamna Revija, Zagreb, no. 2, 25. 5., no. 3—4 30. 6., plurlingva reklamista gaz. kun E.-notoj.
Bohemia, Praha, 26. 7., pri Nürnberg.
Sozialdemokrat, Praha, 25, 7., pri Nürnberg.





Se vi serĉas liverejojn por ĉiuspecaj komercaĵoj kaj industriaĵoj aŭ se vi deziras akcepti la reprezentadon de eksportkapablaj firmoj, turnu vin en via propra intereso al la

**KOMERCISTA ESPERANTO GRUPO FREIBURG I. BR. (GERM.) KATHARINENSTR. 14**

kiu havas bonajn rilatojn al germanaj industriaj kaj komercaj rondoj. — Perado senkosta. — Al demando aldonu resp.-kup.

**Aliĝu hodiaŭ!**

Unua

**Laborista Prunto por Sovjeta Ruslando**

**200 000 anglaj funtoj**

por provizi financon por la agrikulturaj kaj industriaj entreprenoj de la Laborista Internacia Rusa Helpkomitato.

**Aliĝu hodiaŭ!**

**Prunt-akcioj** laŭ valoroj de 10 ŝ., £ 2 kaj £ 5. Rentumo po kvin procentoj ĉiujare. Repagota 1. jan. 1933. Rentumo kaj repago de prunto estas garantiataj de la Rusa Sovjeta Registaro laŭ Dekreto de Konsilantaro de Popolkomisario, 13. sept. 1922. **Helpu** ripari la detruojn ĉe la agrikultura kaj industria vivo de la Sovjeta Respubliko kaŭzitajn per la malsatego. **Helpu** rekonstrui sur socialista fundamento la ekonomian vivon de Ruslando.

**Ĉiuj** petoj pri alskribo de Prunt-akcioj devas esti farataj al **Edgar T. Whitehead, Sekretario de la Laborista Internacia Industria kaj Negoca Kompanio por Helpo al Ruslando (korporacie starigita en Germanujo),** 26 Bedford Row, London, W. C. 1 (Angl.).

**Aliĝu hodiaŭ!**

Fumu

La Esperanto-Cigaredojn

„Tutmonda Esperanto"

„La verda stelo".

**Cigaredomanufakturo Antehmo, Zittau (Saks.**

Baldaŭ aperos

**Eŭropo ĉe la abismo**

de

**Francesco Nitti**

iama ministrara prezidanto itala

**Esperanto-traduko**

kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.

★

Petu prospektojn kaj detalojn kaj sendu antaŭmendojn je favorprezo al

**Frankf. Societäts-Druckerei G. m. b. H., Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M.**

Korespondo en Esperanto. - Ilustr. kartoj rifuzotaj.


# Anoncetoj.

ANGLA MONO PAGOTA (GRANDA SUMO) por ekzemplero de OSTRONIER'AJ TESTAMENTOJ EN RUSA LINGVO, La Vostokov au faksimilo. Skribu al HIRST, 19 Lion Chambers, Huddersfield, Anglujo. [8

MILITINVALIDO petas bonkorajn samideanojn subteni lin per monhelpo, por fondi malgrandan vendejon. Bonvolu skribi al Esperantista Rondeto en Aschach a/Donau (Aŭstrio). [2

FILATELISTOJ! Kiu sendas al mi 100—1000 poŝtmarkojn sialandajn nedifektajn, ricevas saman kvanton de Hispanujo laŭ Ivert 1923. Gabriel Alomar, Prez. de EKP. str. Vallo[illegible] '4 en Palma de Mallorca (Hisp.) [3

### Korespondo kaj Interŝanĝo.

Kiu helpos al studanto de hindustania lingvo per korespondado pri tiu lingvo kaj pri hindaj literaturo kaj popolkutimoj? Skribu, nomante ian ajn servon, kian mi povos miavice fari, al s-o Reggie Hope, 733 Broadway W., Vancouver, B. C. Kanado. — Urdu-Zabán-Men-Likhiye. [3

S-o Rose Jakobo, fervojoficisto en Trieste, via Tor S. Lorenzo 10 (Italujo) deziras korespondi per il. pk. kun eksterlandaj gesamideanoj. Interŝanĝas ankaŭ pm. [1

Esperanto Klubo ĉe Y. M. C. A Jozefo Benagas, Paseo Colòn 161, Buenos Aires (Argentino). Mi deziras ricevi prezar-katalogojn, precipe pri feraj iloj por fondi Hispanan Esperantan Importan Komercan Makleran Agentejon. Multan antaŭdankon al ĉiuj helpantoj. [1

Bonkoraj Kuracistoj! Mi malsaniĝis antaŭ 4 jaroj de spinkurbiĝo, sed ĝis nun mi ankoraŭ ne resaniĝis. Laŭ la konsiloj de la tieaj kuracistoj mi portis gipskorseton dum 4 monatoj, sed sen utilo, ĉar laŭ ilia opinio la kurbiĝo estas tre malsupre. Se iu el via scias certan kuracilon aŭ bonajn konsilojn, mi petegas vin helpo al mi. Aleksander Parov, Miladinova 21, Rusĉuko (Bulg.) [3

Filatelejo „Verda Stelo" Boris P. Kavaljiev, s. Rjahova, Rusensko (Bulg). Vendas ĉiujn bulgarajn p. m. je kompletaj serioj aŭ laŭ mankolisto; la vendataj p. m. estas perfektaj kaj aŭtentikaj ekzempleroj. Oni plenumas nur antaŭpagitajn mendojn; la akurateco estas fiero; prezoj favoraj, postulu prezaron! [2

S-o Dolf van Vesemeel, instr. stud., Heernislaan, Gent (Belgujo), estante I. O. G. F-ano deziras korespondi il. poŝtkarte kaj letere kun gebontemplanoj kaj instruistoj pri abstinentismo, ĉasta vivo, teozofio komenca. [1

Poŝtmarkojn el orientaj landoj vi plej malkare aĉetas ĉe Eldonejo „Esperantista Voĉo", en Jasło (Pollando). Ni sendas pm.-elektojn kontraŭ bonaj referencoj aŭ mondepono. Interŝanĝas pogrande; fuŝosendaĵoj malakceptataj. [5

S-o Reinhard Müller Berthelsdorferstr. 48. en Freiberg/Sa (Germanujo) deziras interŝanĝi il. pk., let. pm. kaj papermonon kun ĉiuj landoj. [2

S-o Conrad Creter, poŝtinspektoro Oberpostdirektion en Köln (Germ.) deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo per il. pk. (bfl.) [2

S-oj Franz Hecker, Gneisenaustr. 3 III. kaj Richard Prause, Kirchstr. 2, ambaŭ en Waldenburg i. Schl. deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. pk, por perfektiĝi en Esperanto. [2

Mi deziras korespondon kun seriozaj kaj idealaj fraŭlinoj, inter 18—20 jaroj, de la tuta mondo, per let. kaj il. pk. pri interesaj kaj sciencaj temoj, Esperante aŭ angle. Robert Pandikow, Peilboot III, Wilhelmshaven (Germ.). [4

S-o Otto K. Ferguson, Jeffersouville. Indiana, Usona, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (prefere la propraj aŭ grupaj fotografaĵoj) kun geknaboj kaj gejunuloj en ĉiuj landoj. Al ĉiuj korespondanto en la malproksima Oriento, mi ankaŭ sendos artilustritan gazeton usonan, [1

S-o Kurt Kanzler, Wiesdorf b. Köln. Elberfelderstr. 37 deziras korespondadon pri scienco kaj tekniko, ankaŭ interŝanĝas esperantaĵojn P. I. kaj P. M. [1

S-o Władysław Wajsfus Radom, Pilsudskiego 16 (Polio) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo, precipe kun homoj en Azio, Afriko kaj Australio. [1

Fraŭlino Ireno Schwarcz (18 j) Prešov, Sobinovska ul. 35 (Ĉeĥosl.) Intererrilaton volas kun ĉiuj-landaj geesperantistoj. Korespondas pri ĉiuj temoj, prefere pri la virina Esp. movado. Kolektas il. poŝtkartojn (bfl.)

S-o Nikolao Peterfy en Arad (Rumanio) Piata Imperatul Traian 1 deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, korespondadi pri spiritismo, teozofio kaj vegetarismo. [1

S-o Gustav v. Gasperini en Graz, Bismarkpl. 3 I. (Austr.) deziras korespondadi per il. pk. (bfl.) kaj letere kun la tuta mondo pri ĉiu temo (prefer pri agrigulturo) [2

S-o Debarbieri Guglielmo Via Casaregis 35/7, Genova (Italia) deziras interŝanĝi postmarkojn kaj illustr. postkartojn kun gesamideanoj de la tuta mondo. prefere Turklando, Greklando, Portugallando kaj Ameriko. [1

S-o Wilhelm Schmitz en Rheydt, Neuperts tr. 31 (Germ.) deziras korespondi per let. pk. interŝanĝas pm. Mi sendos germanajn pm. al vi. [1